

Joseph Freiherr von Eichendorff,

La gaja migranto

tradukita de Ludwig Emil Meier

Se Dio volas vin favori,
Li igas iri vin tra l'mond'
Por mirindaĵojn al vi montri
En sia kreitaĵa rond'.

La malviglul' en hejma domo
Ne ĝojas pro mateno lum',
Lulanta li infanojn homo
Zorgadas nur pro la mastrum'.

Riveroj plaŭdas de l'montaro,
Alaŭdoj ĝojas en aer' -
Ĉu mi ne kantu kun birdaro
Pro la de Dio bela ter'?

Kaj mi nur fidas bonan Dion,
Pro kiu konserviĝas ĝi;
Ĉu mi do zorgu, timu ion?
Pro li prosperos ankaŭ mi!

*Traduko de la Germana poemo "Der frohe Wandersmann" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 - †1857-11-26) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 - †1919) en 1907.*

Arg-234-463 (2006-05-07 20:26:26)

La tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro "Esperantista Kantaro", Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.

Joseph Freiherr von Eichendorff,

La gaja migranto

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom',
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon, al la hom'.

.....
.....
.....
.....

De l' montoj riveretoj fluas,
Alaŭdoj kantas super mi;
Mi ankaŭ gajan kanton bruas
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo.
Li zorgas pri la tuta ter':
Li ankaŭ min, sur mia vojo,
Eterne gardos de danĝer'.

*Traduko de la Germana poemo "Der frohe Wandersmann" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 - †1857-11-26) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-234-462 (2008-04-01 19:09:17)